

Transponta Kongreso (germana-pola-fervojista) nun en 2021! Nova dato: 21.-24.05. (28.05.) 2021 en Frankfurt (Oder) kaj Słubice

tria informilo

Viruso

Ne estos surprizo por vi ke le koronaviruso devigas ankaŭ nin nove disponi. Kiel anoncote ni atendis ĝis post la paskaj ferioj antaŭ decido pri nuligo de la kongreso. Montriĝis ke multaj el la limigoj enkondukitaj en Germanio, Pollando kaj aliaj landoj pro la viruso daŭras kaj estas plilongigataj. En tiu situacio la organizantaj asocioj ne povas kun sufiĉa certeco garantii ke eblos okazigi la kongreson. Alternativa dato ĉijare estus malfacile trovebla, krome riska. La Transponta Kongreso do **ne okazos en 2020.**

Pro la investita laboro (kaj ĉar ni daŭre pensas ke dulanda kongreso kun partopreno de IFEF estas bona ideo) ni esploris pri la eblecoj prokrasti la eventon je unu jaro ĝis la pentekostaj tagoj 2021. La kunvenejoj ankaŭ tiam estos je dispono, kaj la Fonduso por Pola-Germana Kunlaboro indikis sian pretecon ŝovi la anoncitan subvencion por nia kongreso al 2021. La temo “najbaroj” povos resti la sama. Ni ĉiuj estos unu jaron pli aĝaj, sed la Transponta Kongreso okazos!

Aliĝoj

Por la kongreso GEA, PEA kaj IFEF ricevis entute ĉ. 160 aliĝojn (la kutima “dua ondo” komence de la jaro ne venis, ĉar pro la viruso multaj jam hezitis). Ni interkonsentis trakti la ĝisnunajn aliĝojn jene:

1. Ĉiuj aliĝoj por la transponta kongreso 2020 estas konsiderataj kiel aliĝoj por 2021 kaj restas validaj. La ricevita kotizoj eniros la buĝeton por la Transponta Kongreso 2021.
2. Al ĉiuj kiuj deziras oni repagos la kotizon. Tio signifas malaliĝon. Sufiĉas sendi informon al: gek@esperanto.de. Por novaj aliĝoj daŭre validas gek.aligho@esperanto.de. La poŝta adreso estas: Germana Esperanto-Asocio, Katzbachstr. 25, DE-10965 Berlin, telefono +4930 5106 2935.
3. Ni tre dankas al ĉiuj, kiuj indikis sian pretecon kontribui al la programo. Ni kontaktos ilin aparte, sed ĉiukaze esperas ke ilia preteco validas ankaŭ por la venonta jaro.
4. Enspezoj el kongresoj kaj aliaj renkontiĝoj kutime estas gravaj monfontoj por niaj asocioj. Ili grandparte mankos en 2020. Des pli bonvenaj estas donacoj - ĉu por la kongresa kaso 2021, ĉu por la ĝeneralaj kasoj de la asocioj.

Jarĉefkunveno (Federacia Kunveno) de GEA 2020

Germana Esperanto-Asocio planis organizi sian ĉijaran Federacian Kunvenon kiel kutime en la kadro de la kongreso. Invito kaj tagordo ĝustatempe aperis en la asocia revuo (“Esperanto aktuell” 2020/1, paĝo 6). Laŭ la statuto necesas havi Federacian Kunvenon unu fojon jare. La estraro decidis ke en ĉi tiu jaro la kunveno okazu en la kadro de la jam longe planita Asocia Konsilantaro (kunveno de landaj ligoj) sabaton, la 24-an de oktobro en Herzberg (Harz). La tagordo restos sama. Detaloj aperos en la venontaj eldonoj de la revuo.